



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 193

Majo 2002

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto  
Stevens Norvell — kompostisto

Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter  
71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

★ ★

## BONVENON

Kun ĉi-tiu numero, *Inter Ni* komencas sian 17an jaron. Oni pliofte resumas jarfine la enhavon de nia gazeteto. Tamen, lastatempe ni bonvenigis inter ni novajn legantojn, plejparte de Otavo. Kiel redaktoro dum la plejparto de ĝia daŭro, mi deziras skizi kion atingis la gazeto kaj antaŭvidi kion oni povos legi en ĝi.

Harry Lewis iniciatis la gazeteton *Inter Ni* en majo, 1986 kun la helpo de aliaj, kaj redaktis ĝin dum la unuaj tri jaroj ĝis mi transprenis la rolon. Gene Keyes redaktis ĝin dum mi prizorgis pri aliaj aferoj en 1997-8. Laŭ la origina ideo de Harry, la gazeteto restis neformala, amatora afero; la kotizo nur kovras niajn kostojn. Ĉiumonate en tri aŭ kvar paĝoj oni legas divers-specajn artikolojn pri diversaj temoj. Eĉ nuntempe oni povas partopreni laŭ deziro kaj laŭ eblo. Oni rajtas kontribui kion ajn por informi aŭ distri sed ne apartigi la legantojn. En la unua numero Harry klarigis:

„Ni prezentos literaturaĵojn, ŝercojn, enigmojn kaj novaĵon rilate al Esperanto sed por krei efikan interkomunikilon la pli granda parto de la enhavo devos veni de la grupanoj mem. Ni deziras plibonigi kontaktojn kaj rilatojn inter ĉiuj grupanoj, fakte inter iu ajn kiu interesiĝas pri Esperanto.”

La unuaj grupanoj loĝis en la halifaksa regiono kaj ĉeestis lokan konversacirondon. Ni neniam deziris fariĝi klubo kun oficoj kaj kotizoj. Tial la gazeteto ne fariĝis klubo organo. Iom post iom ni allogis novajn partoprenantojn de tiuj kanadanoj kaj eksterlandanoj kiujn ni deziris partopreni en nia komuna interesiĝo kaj agado. La legantaro ankoraŭ restas eta, sed ĝi nun disvastiĝas tra la tuta

mondo, eĉ en fora Mongolio, kie loĝas nia plejnova kontribuanto. Se mi rajtas iomete fanfaroni, la enhavo de nia gazeteto ofte estas tre interesa. Dum la jaroj ni jam ricevis intereseĝajn kontribuadojn de diversaj homoj, kaj ni lernis multon pri diversaj temoj. Ni diskutis aferojn inter ni kaj, eĉ se ni ne ĉiam konsentas unu kun la alia, ni ĉiam emas respekti aliajn vidpunktojn. La legantaro estas tro eta por nomi sin komunumo, sed ni partoprenas en komuna interesiĝo, kio estas komunikado kaj interkompreniĝo pere de la internacia lingvo.

Kion precize oni povos legi en venontaj numeroj de *Inter Ni*? Tute dependas de vi, la leganto. Niaj legantoj estas niaj verkistoj, kaj sen kontribuadoj restas nur la tedaj skribaĵoj de la redaktoro. Bonvenon al ĉiu nova leganto de la gazeteto! Bonvolu kunlabore prezenti ankaŭ viajn pensojn al nia legkomunumo.

— Bob Williamson

## ESPERANTO-MOVADO EN MONGOLIO

fare de Ts. Batzaya, Ulaanbaatar, Mongolio

Kiel notas *Enciklopedio de Esperanto*<sup>1</sup>, en Mongolio jam en la unuaj jaroj de la Esperanto-movado loĝis Esperantistoj, precipe rusoj. Ekzemple estis N.P. Evstifeieff dum 1900 en Urga (korekte: Örgöö, malnova nomo de Ulaanbaatar) kaj I. Puĉkovskij en jaro 1889 en Rus-Mongola komerca urbeto, Kjaĥta (ĝuste: Hiagt, kiu ankoraŭ troviĝas ĉe la landlimo)<sup>1</sup>. Sed mongoloj mem unue eksciis pri la lingvo Esperanto nur post la popola revolucio kaj sendependigo de sia patrolando, Mongolio. Jam antaŭ okdek du jaroj en Turkio estis unu mongolo, nomata Namjiliin Hayanhjarvaa [namĵilijn hajanĥjarva].



Verdire, li estis nur simpla pilgriminto-bonzo, kiu elmigris al eksterlando pro tiutempa malorda politika kaŭzo. Li estis la unua Esperantisto de Mongolio. Li ellernis Esperanton dum li laboris kiel ŝarĝo-portisto en ŝiphaveno apud Stambul. La plej unua E-isto Namĵilijn Hajanhjarvaa reveninte al Mongolio komencis propagandi Esperanton.

Laŭ mia opinio, en la Mongola E-movado estas klare difinitaj kvar ĉefaj periodoj. **LA UNUA PERIODO** ampleksas la tempon ekde 1924 ĝis 1950 jaroj. Reveninte el Turkio en sian landon dum 1924 jaro, simpla pilgriminto-bonzo Hajanhjarvaa komencis propagandi E-n. Li el Esperanto mongoligis la fabelojn de „Nuda Reĝo” de la dana verkisto H.K. Andersen kaj ankaŭ la fabelon „La ĉevaleto kun ĝibo” de la rusa verkisto Jeršov, kaj publikigis en la gazetoj, *Partia Vivo* kaj *Unen* (La vero). Laŭ la paroloj de maljunuloj, samtempe li instruis Esperanton al kelkaj junaj lernantoj kaj oficistoj, inter ili estis juna oficisto, estonta akademiano Junŝobu Rinĉen (1905-1977), kiu plenumis gravan rolon en la Esperanto-movado en

Mongolio. „En 1925 bonan propagandon por Esperanto faris en Mongolio la vizito de sovetia seshoma aerplana flug-ekspedicio, kiu flugis inter Moskvo kaj Ŝanhajo. Tiam okazis renkontiĝo inter sovetia ĵurnalisto Rozenblat kaj Hajanhjarvaa kiuj interparolis, kaj Esperanto estis la interkomprenilo inter ili.”<sup>1</sup> En Ulaanbaatar la unua



E-kurso ekfunkciis en la jaro 1933 sub gvido de Ju. Rinĉen (=Rinchen). Li multe laboris por tio, ke la junularo konatiĝu kun Esperanto. Tiel komenciĝis E-vivo en nia ĉef-urbo, kie la ĉefaj laborantoj estis kamaradoj. Tiam esperantistiĝis kelkaj intelektuloj, kiel ekzemple la estonta d-ro pri historio D. Perlee kaj la tipografia inĝeniero Baatrasenge kaj multaj aliaj. Sed bedaŭrinde, ĵus komencita E-movado en Mongolio tiam ne povis daŭri plu, ĉar inter la jaroj 1934-1937 estis arestitaj pro politika kaŭzo multaj intelektuloj kaj oni pafmortis la plimulton el ili. Inter ili estis preskaŭ ĉiuj, kiuj lernis E-on. S-ro N.Hajanhjarvaa mortis en karcero en la jaro 1934. Ju. Rinĉen kaj Perlee pasigis en malliberejo 5-6 jarojn. Unuvorte, pro la politika kaj ideologia kaŭzoj tiam Esperanto estis devigita silenti longdaŭre. La ĉefa rezulto de la unua periodo estis tio, ke Mongoloj informiĝis pri la internacia lingvo Esperanto.

**LA DUA PERIODO** daŭris inter 1950-1970. Dank' al revigligo de la Esperanto movado en la tiamaj socialismaj landoj alvenis la tempo por prizorgi pri Esperanto en Mongolio. Ju. Rinĉen verkis kaj je la komenco de sesdekaj jaroj eldonis unuan aŭtodidaktan lernolibron de Esperanto por mongoloj. B. Dagva, kiu lernis Esperanton en Pollando, kompilis kaj eldonis koncizan dudirektan vortaron Mongolan-Esperantan kaj E-Mongolan. Tuj post la apero de la unua lernolibro de Esperanto, la fama mongola verkisto Lodongiin Tudev de sur la tribuno de Kongreso de Mongola Junularo instigis gejunulojn lerni la lingvon Esperanton. En la gazetoj kaj ĵurnaloj aperis kelkaj artikoloj. Tiam la lernolibroj de d-ro prof. Ju. Rinĉen, kiuj estis eldonitaj per 3000 ekzempleroj, tuj elĉerpiĝis. Sed eklernis la lingvon malmultaj, kaj poste la plejmulto el ili ĉesis sian lernadon de Esperanto ĉar, krom la lernolibro kaj vortareto, nenio estis por legi kaj perfektigi la scipovon de la lingvo Esperanto. Meze de la sesdekaj jaroj en Ulaanbaatar, la nuna eminenta film-aktoro B. Damchaa kaj Ch. Dogsuren komencis lerni Esperanton kune en sama E-kurso. En Sovetio, mongolaj studentoj S. Jansaŝjav en Ufo kaj O. Buuvei en Moskvo vizitinte E-kurson lernis Esperanton. S-ro Ch.



Dogsuren jam preparis lernolibron de profesoro Rinĉen por la dua kaj tria eldono kaj eldonis la duan en la jaro 1967 kaj la trian en jaro 1986 (kvara eldono jam aperis en la jaro 1992!). La ĉefa rezulto de la dua periodo estis, ke oni ekhavigis al mongoloj la lernolibrojn kaj vortaretojn de Esperanto, kaj la nombro de amantoj (interesuloj) de Esperanto, kvankam tre malmultaj, sufiĉe kreskis.



**LA TRIA PERIODO** estis inter la jaroj 1970-1990. En 1970 estis fondita la Mongola Esperanto Unuiĝo, refondita en 1996 j kiel Mongola Esperanto-Asocio laŭ la iniciato de kelkaj aktivaj E-istoj. La volontula organizaĵo kelkfoje funkciigis elementajn kaj mezgradajn kursojn, kiujn vizitis pli ol cent gejunuloj. Unu el ili, s-ro Balduuziin Dorĝ (dorĝh), dumtempe gvidis la Mongolan Esperanto-Asocion. Komence de la okdekaj jaroj Ch. Dagsuren mongoligis el Esperanto la tri volumojn de historia romano *Faraono*, de la pola verkisto Boleslav Prus. La unuajn du volumojn oni eldonis dum tiuj jaroj kaj la lastan trian volumon ĵus antaŭ du jaroj. S-ro B. Dorĝ tradukis la plenan libron *La mono de sinjoro Arne* de la sveda Nobelpremiita verkistino Selma Lagerlöf kaj eldonis ĝin libroformate. La tradukoj faris bonan propagandon pri Esperanto.

**LA KVARA PERIODO** komenciĝas ekde 1990. Dank' al nova demokratia atmosfero alvenis la tempo por pli stabile organizi la E-movadon en Mongolio. Pro la konvena tempo de demokratiigo (tutmondiĝo), ni antaŭ ĉio reorganizis la Mongolan Esperanton Unuiĝon al Mongola Esperanto Asocio. Kaj ĵus antaŭ du monatoj tutnove restrukturita sub la nomo „Mongola Esperanto Ligo” kun sia konstanta sidejo. Antaŭ la Mongola Esperanto Ligo staras multe da farendaj, plenumendaj laboroj. Kvankam kiel antaŭe mankas mono kaj forto, tamen ni mongolaj E-istoj estas ĉiam pretaj fari ĉion plejblan, kion ni povas por disvastigi Esperanton en Mongolio.

<sup>1</sup> Enciklopedio de Esperanto, L. Kökény, V. Bleier, K. Kalocsay, kaj I. Ŝirjaev, Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, dua eldono 1986, artikolo fare de N. Nekrasov, p. 376.

